# TEJO-aktuale: numero 185, 2007-03-30

**Informa Kanalo Abonu.Com**

---

---

T E J O - A K T U A L E N-ro 185 (30 marto 2007)

---

Senpaga informletero de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
<http://www.tejo.org>

---

1. 63-A INTERNACIA JUNULARA KONGRESO EN VJETNAMIO
2. SPECIALAJ KOTIZOJ POR JUNULOJ ĈE UNIVERSALA KONGRESO
3. NJE SERĈAS SAKRAĴOJN!
4. NOVA ELDONO DE PASPORTA SERVO HAVEBLAS
5. PARTOPRENU IJK-N HELPE DE TEJO
6. PRAKTIKA MANLIBRO POR VIKIPEDIO

---

1. 63-A INTERNACIA JUNULARA KONGRESO EN VJETNAMIO

Jam pli ol 110 homoj estas aliĝintaj al la ĉi-jara IJK, kiu okazos en Hanojo, la ĉefurbo de Vjetnamio, de 2007-07-27 ĝis 2007-08-03. Kiel kongresejo servos la Hanoja Fremdlingva Universitato, kaj la temo de la kongreso estos "Paco, kunlaboro kaj disvolviĝo". Tiuj, kiuj frue aliĝas al IJK, ankoraŭ ĝuas pli favoran kotizon - la limdato por la dua aliĝperiodo estas la 30-a de aprilo (validas la dato, kiam la Loka Kongresa Komitato ricevas vian antaŭpagon kaj aliĝilon). Do ne prokrastu aliĝi! Pliaj informoj pri IJK legeblas ĉe <http://www.tejo.org/ijk>.

---

2. SPECIALAJ KOTIZOJ POR JUNULOJ ĈE UNIVERSALA KONGRESO

Por junuloj, kiuj intencas ĉeesti la 92-an Universalan Kongreson de Esperanto (okazontan en la urbo Jokohamo, Japanio, inter 2007-08-04 kaj 2007-08-11), ekzistas specialaj rabatoj! Ĉiuj, kiuj naskiĝis inter 1977-01-01 kaj 1986-12-31 (inkluzive) rajtas pagi favorajn aliĝokotizojn - tamen rimarku, ke la findato por la dua aliĝperiodo alproksimiĝas, do se vi interesiĝas, aliĝu nun por ĝui la nuntempan rabaton. Junuloj naskiĝintaj depost 1986-12-31 povas aliĝi sen pagi ajnan aliĝokotizon!

Por tiuj, kiuj jam aliĝis, la Dua Bulteno disponeblas ĉe
<http://uea.org/kongresoj/2007/dua_bulteno.html> kun ĉiaj informoj pri la programo, ekskursoj, loĝebloj, informoj pri Japanio kaj Jokohamo, ktp. Jam alighis preskaŭ 1500 personoj el 54 landoj. Vi povas trovi kromajn informojn pri UK-2007 ĉe <http://www.uea.org/kongresoj/uk_2007.html>.

---

3. NJE SERĈAS SAKRAĴOJN!

Ĉu esperantistoj estas tro ĝentilaj por diri sakraĵojn inter si? Norvega Junularo Esperantista (NJE) pensas, ke ne - ili lanĉas konkurson por trovi la plej originalajn, plej surprizajn kaj plej vulgarajn sakraĵojn elpenseblajn en la internacia lingvo! Ĉiuj rajtas partopreni en la konkurso, kaj estas nur unu kondiĉo: la vortoj ne ataku unuopulojn. La plej lertaj sakristoj ricevos kompakt-diskojn de Vinilkosmo kiel premiojn. Se vi eksakremas, sendu viajn kontribuaĵojn antaŭ la fino de aprilo. Pliajn informojn vi serĉu ĉe

<http://www.esperanto.no/nje/ind/ind2006-06.php>.

---

4. NOVA ELDONO DE PASPORTA SERVO HAVEBLAS

Jam aĉeteblas la 2007-a eldono de Pasporta Servo, la libro per kiu vi povas gastiĝi senpage tra la tuta mondo ĉe la hejmoj de aliaj e-istoj. En la ĉi-jara libro troviĝas kontaktinformoj por 1294 adresoj en 89 landoj. Krome, la retejo de Pasporta Servo estas lastatempe migrinta en la novan TTT-ejon de TEJO; ĝi tamen ankoraŭ troviĝas ĉe la sama adreso, nome <http://www.tejo.org/ps>.

---

5. PARTOPRENU IJK-N HELPE DE TEJO

TEJO ĝoje anoncas, ke la fonduso "Partoprenu IJK-n" denove akceptas kandidatiĝojn de aktivemaj TEJO-membroj, kiuj deziras subvencian helpon je siaj vojaĝkostoj, loĝado kaj kotizo por la 2007-a IJK en Hanojo.
La estraro de TEJO pritraktos la kandidatojn kaj disdonos maksimume kvin premiojn financontajn ĝis 80% de ĉiuj kostoj. La kondiĉojn vi povas legi ĉe <http://www.tejo.org/eo/partoprenu_2007>; rimarku, ke kandidatiĝaj leteroj alvenu al la Centra Oficejo antaŭ la 1-a de majo (2007-05-01). La fonduson nur financas malavaraj donacoj de aliuloj; se vi volas kontribui, vi ĉiam povas sendi vian donacon al la konto "tejtej", indikante "Donaco por fonduso 'Partoprenu IJK-n'".

---

6. PRAKTIKA MANLIBRO POR VIKIPEDIO

Ĵus aperis nova dua versio de la 40-paĝa plenkolora libreto "Vikipedio, praktika manlibro", kune farita de E@I kaj TEJO kaj eldonita de la eldonejo ESPERO. Ĉi tiu bonkvalita broŝuro prezentas skizon de la historio kaj celoj de la libera interreta enciklopedio-projekto Vikipedio (<http://eo.wikipedia.org>), kaj klarigas kial oni verku artikolojn por ĝi kaj kiel fariĝi bonega vikipediisto. Ankoraŭ eblas antaŭmendi ekzemplerojn de la broŝuro kontraŭ rabatitaj prezoj - ĉe mendoj ekde 10 ekzempleroj ĝi kostas po 1,20 eŭrojn por peco, kaj ĉe mendoj ekde 100 la broŝuro kostas po 1 eŭron por peco. La antaŭmenda periodo tamen nur daŭros ĝis 2007-04-12, do mendu nun! Troviĝas kromaj informoj ĉe <http://www.tejo.org/eo/node/424>.

---

TEJO-AKTUALE - Senpaga informletero de TEJO

La ideo: <http://www.esperanto.org/tejo/publikajhoj/aktuale/koncepto.html>.
La arkivo: <http://www.tejo.org/tejo-aktuale>.
La aliĝo: <http://www.abonu.com/catalog/info.tejo>
Informojn kaj komentojn sendu al <aktuale-red@tejo.org>.
La teamo de TEJO-aktuale estas:
Jevgenij GAUS, Gabriel BEECHAM.
Tiun ĉi numeron redaktis Gabriel BEECHAM.

---

http://abonu.com/ Malabonu
Retadreso: demandu@abonu.com Elektu alian kodigon